

9-a Kultura Semajnfino Esperantista de KCE en Ĝenevo
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 672, 1976.08.25 & 27 & 28

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La 15-an kaj 16-an de majo disvolviĝis en Ĝenevo la naŭa Kultura Semajnfino Esperantista. Tiu ĉi renkontiĝo grupigis pli ol 60 personojn, kiuj venis el Svislando kaj Francio.

A.- Enirante la salonegon de la paroĥa centro La Servette oni tuj rimarkis la gravecon de la libro-ekspozicio muntita de Kultura Centro Esperantista, centoj da volumoj viciĝis laŭ la longo de la tuta prelegejo, kaj estis videble, ke nuntempe la eldon-dinamismo apartenas al Belgio, Popola Ĉinio, Danlando kaj Japanio. Ĉu tio signifas, ke la influo de Azio kreskas, ni esperas.

Cl.- La infanoj formis parton de la kunvenintaro. Por ili disvolviĝis, paralele al la plenkreskula programo, aparta programo pli sporta kaj manlabora, sub la gvidado de geedukistoj.

A.- Apartenis al sinjoro Claude Piron, antaŭe tradukisto por UN kaj Mondorganizaĵo por la Sano, nuntempe instruisto en la Universitato de Ĝenevo, respondi al la demando : « Esperanto – ĉu eŭropa aŭ azia lingvo ? » La prelegisto substrekis, ke la demando estas malbone formulita : la bengala kaj la cingala apartenas, kiel la franca kaj la angla, al la granda lingvo-familio de la hind-eŭropaj lingvoj, dum la hungara kaj la finna aniĝas al alia lingvo-grupo kun la mongola. Kien loki esperanton ? Se la akordiĝo de la adjektivo nombre retroviĝas nur en la flekciaj lingvoj hindeŭropaj kaj semidaj, la regula derivadsistemo estas karakterizo de aglutinaj lingvoj. Verba formo kiel **revenigeblas** havas ekvivalentojn nur en uralaj-altaaj lingvoj, kiel la turka. Sed per pli ol unu trajto, kiel ekzemple la senŝanĝaj vortelementoj, manko de konjugacio, sinteno de la personaj pronomoj kaj de la posedaj adjektivoj, ebleco uzi la afiksojn senpere, esperanto situas inter la izolaj lingvoj, kiel la ĉina kaj la vjetnama. Kio en esperanto mirigas la amatoron de kompara lingvistiko, tio estas la homogeneco de la lingvo, kiu rezultas de la absoluta respekto de la principo de nevarieco de la morfemoj, tuj perceptebla en gramatika analizo. Sinjoro Claude Piron donis tre interesajn ekzemplojn, komparante esperanton al la diversaj lingvoj, el kiuj li regule tradukas, tio estas la angla, ĉina, hispana, franca kaj rusa.

Cl.- Ni scias, ke sinjoro Claude Piron, post tiu ĉi ĝeneva Kultura Semajnfino Esperantista, verkis tre detalan eseon pri la sama temo. Kiam ĝi aperos, ni ĝin recenzos.

A.- La arta kaj varietea vespero malkaŝis du talentojn. Sub la gvidado de Andres Bickel la junularo ĝeneva ludis kelkajn tradukitajn skeĉojn de Fernand Reynaud kaj originalaĵon de Zora Heide. Ĉiuj povis aprezi la aktoran talenton de Andres Bickel, kiu intencas formi teatran grupon. Olivier Tzaut interpretis kiel solulo kaj kun siaj gefiloj kanzonojn tradukitajn el plej diversaj lingvoj. Ni havos la okazon aŭdigi dum la venontaj semajnoj eron el nun aĉetebla sonbendo, kiun registris la sonĉasista asocio de la urbo La Chaux-de-Fonds. Aĉetumuloj sin turnu al Kultura Centro Esperantista, 2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando, aŭ petu la necesajn informojn tra la kanalo de nia radio.

Cl.- La arta esprimiĝo en psiĥozo estis la temo de la dimanĉa mateno. Ĝin pritraktis la psikiatro Tazio Carlevaro, kuracisto en la kantono de Neuchâtel. Li memorigis, ke unueca difino de la vorto « psiĥozo » ne ekzistas, kvankam oni ne povas negi la ekziston de tiu ĉi

realeco. Pri ĝia etiologio, kaj do koncerne la kuracadon, la vidpunktoj diverĝas. Kelkaj iras ĝis negi la malsanon, dum aliaj nur vidas biologian procezon pli malpli nereverseblan. Psiĥoza manifestiĝo estas konata : retiriĝo el la ekstera mondo, primitivaj angoroj, karakteraj kaj intelektaj perturboj, ktp. Per projekcio de diapozitivoj, fotoj de desegnaĵoj kaj pentraĵo de psiĥozuloj, la prelegisto demonstris, ke oni povas alproksimiĝi de la mondo de la psiĥozuloj per la analizado de la formaj karakterizaĵoj de iliaj desegnaĵoj. Tio igas explorebla la profundan problemaron, kiu troviĝas je la origino de la observataj perturboj.

A.- La interesata publiko faris multajn demandojn, al kiuj sinjoro Tazio Carlevaro respondis, kun sia neordinara talento kaj bonhumoro. Ĉiuj povis konstati, kiom vasta estas la esplorkampo, kiun la prelegisto apenaŭ povis malkovrigi.

Cl.- Dum tiuj ĉi semajnfinoj la partoprenantoj alportas siajn manĝaĵojn, ili havas la eblecon aĉeti trinkaĵojn en improvizita bufedo. Por la tagmanĝo la tabloj estis transportitaj eksteren en etan korton, kie ĉiuj povis ĝui pri varma suno.

A.- Formiĝas kaj malformiĝas diskutgrupoj, kiel ne povus okazi en restoracio, kaj tio ĉi multe favoras la kontaktojn. Tiuj ĉi kulturaj semajnfinoj ludas tre pozitivan rolon, akcelante la disvolviĝon de nia eta socio esperanta, kiu tendencas dormeti pro manko de tiaj renkontiĝoj. Sufiĉas vidi, kiom da libroj oni povas vendi, kiom da novaj agadoj naskiĝas en tiuj ĉi momentoj, kiom da balbutantoj transformiĝas en lertaj praktikantoj de la lingvo inter du semajnfinoj, por konkludi pri la kultura graveco de tiuj ĉi aranĝoj.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!